



la informilo

* * *

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO ~ FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F
PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série

trimestriel

1^{er}- trim. 1982

n° 37



abonnement

un an: 18F

UNU JARO : 18 F


(8 INTERN. KUPON.)

A tous nos lecteurs, nos meilleurs vœux pour 1982 et bon courage dans la poursuite de nos efforts communs pour une meilleure communication entre tous les hommes !

... où sont les plus astucieux ? ...

ici... ou là?

*Je parle français. Falu português.
Ja mówię po polsku. Jeg taler
norsk. Μιλώ Ελληνικά. Ek præst
friksaans. Jeg snakker dansk. Saya
chata Bahasa Malaysia. Ja govorim
bosnahravščini. Я говорю по-русски
Hablo español. Türkçə bilirim.
Ik spreek Nederlands. Parl
ai catalá. Mluvím čes
ky. Puhuu suomea*



dans ce n° : tout sur

notre prochain congrès

ANTO...FLASH★ESPERANTO... FLASH★ESPERANTO

Notre Congrès à MULHOUSE

Le 3 et 4 avril 1982, le Centre Alfred WALLACH de MULHOUSE-RIEDISHEIM accueillera les participants de notre Congrès annuel. L'hospitalité des Alsaciens étant ce qu'on connaît, on peut être certain du succès de ces assises internationales (par tradition en effet notre rassemblement groupe nombre d'amis des pays voisins... et même éloignés!). Si l'on ajoute que Jak LEPUIL, auteur-chanteur-compositeur parisien espérantophone animera la soirée du 3, on peut être assuré à l'avance de l'ambiance excellente qui régnera au cours des débats. Une gamme alléchante de visites est également programmée. Tous renseignements et inscription dans le feuillet spécial joint à ce numéro de LA INFORMILO.



UN STAGE CULTUREL DE QUALITE A TROYES

Si les "Grosses Têtes" de RTL bénéficient -volontairement?- d'une information sélective, nous leur signalons à nouveau que les espérantophones de France vivent et font fructifier en permanence leur langue internationale. Après le succès du 14ème stage international de NANCY (5 nationalités et 90 participants) ce sont nos amis de l'Aube qui prennent le relais. Dans le cadre du "Centre Villages, Vacances, Familles Yvonne MARTINET" de Mesnil-St-Père (entre Bar-sur-Aube et Troyes) un week-end culturel particulièrement riche rassemblera les 27 et 28 mars 1982 nombre de pratiquants -et de commençants!- de l'espéranto. La notoriété des animateurs cautionne déjà la réussite: Perla Martinelli, Olivier Tzaut, Giorgio Silfer! Ce trio international d'instructeurs assurera des cours de 3 niveaux; toute personne intéressée par l'espéranto pourra donc en commencer l'étude à ce stage. Toutes informations auprès de

Suzanne BOUROT, 15/B rue Morel-Payen, F 10000 TROYES



LOUIS PERGAUD TRADUIT A SON TOUR EN ESPERANTO

Disparu très jeune au cours de la première guerre mondiale, Louis PERGAUD, dont on va célébrer le centenaire de la naissance, a connu très tôt la notoriété grâce à une série de romans dont le plus connu est à coup sûr "La guerre des boutons". Déjà traduites en plusieurs langues et adaptées au cinéma, les aventures héroïco-comiques des écoliers de Longueverne vont enfin être à la disposition des espérantistes du monde entier grâce à une édition en langue internationale; dans une traduction de Roger BERNARD -un gage de travail bien fait- ce livre illustré en couleurs avec des dessins de Lapointe sera très bientôt en vente. Cette initiative revient au Centre Culturel de La Chaux-de-Fonds, dont l'un des dynamiques responsables, Claude Gacond, est membre de l'Association "Les Amis de Louis Pergaud".






Olivier Tzaut nous avait promis un second disque... voilà qui est fait. "Karnavaletō" est désormais à la disposition de tous les mélomanes qui avaient déjà apprécié la voix chaude et délicate de notre ami suisse dans son premier 33T "Tra la mondo". 10 nouvelles chansons traduites ou originales, accompagnées par un ensemble de qualité où guitares, mandolines et vibraphone se mêlent à l'orgue et aux instruments de percussion. Ce recueil qui existe aussi en cassette est en vente à notre service de librairie. Il sera bien sûr également disponible lors de notre congrès Fédéral de Mulhouse.

ESPERANTO ET PHILATELIE... suite!

Comme nous l'avions annoncé précédemment, à l'instar des grands Congrès Universels, le rassemblement international d'Anvers (24 au 31 juillet 1982) aura aussi son timbre-poste en espéranto. Mis en vente le 6 juin, sa valeur d'affranchissement sera de 10F belges, correspondant au tarif intérieur ou à celui d'une carte postale expédiée à l'étranger. Notons à ce propos que 470 espérantophones de 42 pays se sont déjà inscrits au Congrès à la date du 15 décembre 1981.



le timbre du Congrès de BRASILIA



ESPERANTO ET TELEVISION

Le petit écran participe également, et ce dans tous les pays du monde, à l'information du grand public sur les réalisations de l'espéranto et les perspectives qu'il offre. Intervention d'une espérantiste dans l'émission "Aujourd'hui madame", interview à la télévision belge et luxembourgeoise à propos des problèmes de l'Europe et de l'inauguration d'un atelier "espéranto", nombreuses émissions en Bulgarie et en Hongrie. La programmation d'un cours télévisé, tel qu'il existe déjà pour d'autres langues nationales, est à l'étude. Rappelons que l'expérience a déjà eu lieu dans plusieurs stations étrangères.

UN ORDINATEUR POLYGLOTTE PRIVILEGIE... L'ESPERANTO!

C'est au professeur Bruce Sherwood, physicien au laboratoire de recherche sur l'enseignement par ordinateur de l'Université de l'Illinois que nous devons cette expérience particulièrement révélatrice des possibilités cachées de la Langue internationale. Après avoir relié un ordinateur de base à un synthétiseur dont la "palette vocale" s'étend sur 40 sons de 4 niveaux d'intensité différents et de durée variable pour les voyelles, le professeur Sherwood a soumis à la machine un texte rédigé successivement en 8 langues dont l'Espéranto. A l'audition c'est l'Espéranto qui est arrivé nettement en tête... alors que l'anglais avec la complexité de son système de sons et d'intonations, de la prolifération de ses voyelles, des difficultés de prononciation de ses consonnes et de son rythme particulièrement compliqué a posé au chercheur et à la machine les problèmes les plus ardus. Cette supériorité de l'E° pourrait avoir une répercussion dans l'enseignement des langues et plus encore dans le traitement de l'information et dans l'intercommunication.





AU TEMPS DES MOUSQUETAIRES ...

Les amateurs de romans de cape et d'épée vont être ravis: Voilà un récit picaresque directement écrit en espéranto par un récidiviste de bon aloi dont les nouvelles policières ont déjà captivé les espérantistes. Lorjak nous ramène au XVII^e siècle entre le Pont-Neuf et la Place Royale: on a enlevé l'échevin Regulus Galvin... Un livre qu'on ne lâche pas facilement... et qui sera certainement réédité sans tarder!

UN ESPERANTISTE ALSACIEN... TRADUIT EN CHINOIS!

Des milliers de lecteurs de par le monde ont apprécié depuis des années les "dialogues amusants" de A. Lienhardt. Ce véritable kaléidoscope de scènes humoristiques de la vie quotidienne, rédigé dans la langue de tous les jours, a servi de livre de chevet à nombre d'espérantophones frais émoulus de leur cours d'initiation; voici qu'une nouvelle édition de ces irremplaçables "amuzaj dialogoj" vient de voir le jour... à PEKIN!... sous une forme bilingue. L'humour occidental se mondialise!



L'ESPÉRANTO ET L'ÉCOLE MODERNE

L'Institut Coopératif de l'Ecole moderne organise une rencontre internationale à GYULA (Hongrie) du 11 au 20 juillet 1982, rencontre au cours de laquelle l'espéranto sera la seule langue de travail. L'ICEM est en fait l'organisme français qui diffuse les techniques éducatives de Célestin FREINET, dont nous avons déjà parlé dans nos colonnes; un hommage particulier vient de lui être rendu puisque grâce à une équipe d'enseignants français, le plus célèbre recueil du pédagogue, intitulé "Les dits de Mathieu", vient d'être édité en espéranto; C'est un véritable florilège de constatations et de conseils d'ordre pratique qui justifie et construit les bases d'un enseignement adapté au monde d'aujourd'hui. La "Diroj de Mateo" est un livre riche, empreint de bon sens et d'humour, qui intéressera tous les lecteurs, même non directement concernés par les problèmes de l'Ecole Moderne.

LE PREMIER CONGRES INDIEN D'ESPÉRANTO


Lentement mais inexorablement la Langue Internationale se répand dans tous les pays en voie de développement. C'est ainsi que l'Inde organise du 5 au 7 février 1982 son 1er Congrès d'Espéranto. Dans ce vaste pays où la prolifération des langues et des dialectes locaux rend l'intercommunication extrêmement difficile l'introduction de l'espéranto peut avoir des répercussions fructueuses. N'oublions pas que là-bas l'anglais n'est parlé que par une élite très peu nombreuse et la centaine de phrases-clés balbutiées par le commerçant ou le chauffeur de taxi ne doit pas faire illusion. Le récent périple au pays de Gandhi de notre ami luxembourgeois TRIKINI, magicien espérantophone de réputation mondiale a certainement sensibilisé une partie de responsables d'associations culturelles. Le grand journal du bengale occidental "Nabadwip Barta" a publié une série de leçons d'E° et des articles relatifs à ce Congrès.



★ 41.a KONGRESO ★
DE L'ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

→ sabaton la 3-an kaj dimancon la 4-an ←
de aprilo 1982

bulletin d'adhésion
dans le dépliant
informatif joint



SI VOUS NE POUVEZ PAS PARTICIPER AU CONGRES FEDERAL DE MULHOUSE

(A) Vous êtes membre de la Fédération Culturelle de l'Est pour l'Esperanto:

envoyez votre "pouvoir" à notre trésorier:

M. ANDRE GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

(B) Vous êtes membre de la Fédération... et en même temps membre titulaire de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO (cotisation égale ou supérieure à 125 F + 10 F)

→ Utilisez le bulletin de vote inclus dans la REVUE FRANCAISE d'ESPERANTO...

mettez ce bulletin dans une première enveloppe ne portant aucun signe extérieur. Placez cette enveloppe fermée ainsi que votre "bon pour pouvoir" ci-dessous, dans une seconde enveloppe que vous adresserez à notre trésorier (adresse ci-dessus).



B O N P O U R P O U V O I R

Je transmets mon pouvoir pour me représenter, lors de l'ASSEMBLEE GENERALE de la FEDERATION à **MULHOUSE** à Monsieur (Madame, Mademoiselle) _____ qui participera au CONGRES.

NOM

ADRESSE

Date:

Signature:

... angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj!


Legante la agadraporton de la pasinta jaro, vi veršajne konstatos, ke multe realigis en nia Federacio. Sed tio estis nur la unua pašo de daûra agado en nia regiono. Kvankam la nombro de la federacianoj kreskis je 15% en unu jaro, sukceson menciindan ni nur atendu post kelkaj jaroj, kaj nur se ĉiuj streĉe laboras sammetode kaj samcele.

Naciskale U.F.E. (kiu arigas 12 Federaciojn) lanĉis ambician programon (vi aûdos pri ĝi). Nia Federacio, kiu arigas ĉiujn lokajn esperantistojn agu regione. En MULHOUSE la Federacia kongreso estos la okazo prezenti al vi ĉiujn niajn planojn. Ne timu sterilajn diskutojn: la kutimajn, rutinajn oficialaĵojn ni likvidos laueble dum la sabata posttagmezo, tial ke la tutan dimanĉan matenon ni povos diskuti kun vi kaj aûskulti ĉies proponojn. Ni bezonas vian opinion!

Sed neniel pensu, ke ni nur volas laborigi vin! La Mulhouse-aj organizantoj preparis por vi sabatan vesperan spektaklon... en ESPERANTO... kun la kanzonisto Jak LEPUIL de la Esperanto-Kabaredo "Ruza Kruco". Ké Mulhouse posedas unikajn, landskale konatajn muzeojn, fervojan, tekstilan kaj aûtomobilan, same kiel belegan zoologian ĝardenon, vi certe scias. Krome la moderna kongresejo troviĝas en belega parko...

*Do: Venu amase el Francio kaj el eksterlando.
Ni tutkorle invitas vin!*

J. Bellu



agadraporto

Tiu raporto baziĝu sur faktoj. Jen do la agado realigita dum ĉi-tiu jaro:

= sendo de leteroj al la Akademi-Inspektoroj de ĉiuj ok departementoj de la Federacio por reklami pri niaj korespondaj kursoj ĉe la instruistaro. Dank' al la agnosko fare de la Ministerio pri Nacia Edukado, la inspektoroj informis ĉiujn elementajn kaj post-elementajn lernejojn publikajn kaj privatajn (kun kontrakto) pri parolaj kaj skribaj E°-kursoj.

= eldono de reklamiloj pri la Pasport-Servo kaj la korespond-kurso de la Federacio, disdonitaj en studento-loĝejoj de METZ, NANCY, MULHOUSE kaj STRASBOURG.

= eldono de novaj flugfolioj por la informpetantoj de la koresponda kurso.

= sendo de relandetero al 80 eks-federacionoj kaj legintoj de LA INFORMILO.

= kompletigo de la reto de delegitoj sur la flavaj paĝoj de la telefon-libro (almenaŭ unu en ĉiu departamento de la federacio).

= organizo en NANCY de seminario por kursgvidantoj, kiu arigis 30 instruemulojn.

= organizo de staĝoj en METZ kaj NANCY.

Ĉu mencindas la rezultatoj? Ni paroligu la ciferojn kaj lasu vin juĝi mem.
(interkrampe la ciferoj de la lasta jaro)

177 (154) individuaj membroj de la federacio
79 (65) membroj de UFE
41 (39) individuaj membroj de UEA
3 (3) individuaj membroj de TEJO
8 (7) membroj de JEFO
270 (228) abonantoj de nia bulteno "LA INFORMILO"
45 (70) partoprenintoj en la kongreso
50 (75) partoprenintoj en la junia staĝo (METZ)
90 (85) partoprenintoj en la novembra staĝo (NANCY)
50 (60) aliĝintoj al la koresponda kurso
<i>En 6 (9) urboj funkciias E°-kursoj parolaj</i>

Fine jen statistiko pri la membroj laŭ la departemento:

U.F.E.

FEDERACIO

1 - Bas-Rhin:	20 membroj	1...	41 membroj
2 - Haut-Rhin:	20	2...	23
3 - Meurthe et Moselle:	11	3...	20
4 - Meuse:	7	4...	26
5 - Vosges:	7	5...	10
6 - Moselle:	5	6...	29
7 - Marne:	4	7...	7
8 - Haute-Marne:	2	8...	4

(kelkaj membroj volis resti anoj de nia Federacio, kvankam ili ne plu loĝas en tiuj departemento)

Kaj nun mi finu per danko al ĉiuj niaj helpantoj kaj mi diru al vi ĉiuj: bonvolu relegi, cerbumi, noti viajn rimarkojn. Dum la kongreso ni komune starigos novan agadplanon.

La sekretario

Edmond LUDWIG

kontoraporto *

NIAJ DONACINTOJ

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1981:

S-rº CROCHET 41F - S-rº KILQUE 11F - S-rinº ORY 246F - S-rº BLESSING 56F
 S-inº ROEDEL 14F - F-inº ESPRIT 11F - S-rº FUCHS 22,80F - S-rº BERGEROT 127F
 S-rº FONDRIILLON 126F - S-rº BASSO 19F - Komitatanoj 116F - S-inº LE CORGNE 99F
 S-rº B. DENIS 50F - S-rº CUENE 31F - S-rº CONCESSI 25F - Diversaj donacintoj 43,80F
 Vendo de donacitaj vortaretoj fare de S-rº LIENHARDT 300F

sume: 1 338,60F

FINANCA RAPORTO PRI LA JARO 1981

E N S P E Z O J

E L S P E Z O J

kotizoj

63 individuaj membroj	10 187 F
14 simplaj membroj	420
93 federaciaj membroj	1 023
4 JEFO-membroj	20
1 GEE-membro	11
Donacoj	1 338,60
Abonoj al Eº-revuoj	129
Ekzamenoj en METZ	59,20
Vendo de glu-markoj	17
rentumo Spar-konto + respondkup.	488,76

13 693,56

Kotizoj al UFE	9 229 F
" al GEE	402
" al JFEO	454
Afrankoj + Sekretariajjoj	111,10
Komitat-kunsido	194
UFE-kunsido	300
Perado de abonoj	120,20
Propagando	982,40
Donaco al UFE	500

12 292,70

Eldonado de LA INFORMILO en 1981

E N S P E Z O J

272 abonantoj	3 822 F
repago dokumentoj	28,60
	<hr/>
	3 850,60

E L S P E Z O J

Eldonado INF. 33 (430 ekz)	743,50
" 34 (380)	621,10
" 35 (400)	806
" 36 (380)	880
Send-kostoj por INF 33	23,10
" 34	40,12
" 35	31,95
" 36	32
Etikedoj por INFORMILO	147
Send-kostoj al eksterlando	118

3 442,77

B I L A N C O

Enspezoj federacio	13 693,56 F
Elspezoj Federacio	- 12 292,70
	<hr/>

Profito Federacio	1 400,86
-------------------	----------

Enspezoj INFORMILO	3 850,60
Elspezoj INFORMILO	- 3 442,77
	<hr/>

Profito INFORMILO	407,83
-------------------	--------

R E Z U L T O

En la kaso je la 31/12/1980	5 783,17 F
Profito Federacio	1 400,86
Profito INFORMILO	407,83

En la kaso je la 31/12/1981	7 591,86 F
-----------------------------	------------

Nia financa situacio estas en bona stato dank' al niaj malavaraj donacintoj kaj dank' al la plimultiĝo de niaj abonantoj. La kasisto:

nia vivo en . . .

NANCY

La nova lernjaro komenciĝis per granda laboro. post unua kunveno la 24an de septembro, kiujn vizitis 10 personoj, ni preparis la eldonon de nova propagandilo por E° laŭ modelo verkita de S-rº P. Denis. Dua kunveno la 22an de oktobro kunvenigis 14 aktivulojn. Tiam disdoniĝis la nova propagandilo kune kun diverstipaj afiŝoj. La federacio krome eldonis flugfoliojn pri la "Pasport-Servo".

Entute ni disodnis en NANCY, ĉefe en studentaj medioj, (restoracioj, universitataj hejmoj), sed ankaŭ en magazenoj, turism-oficejo, junuldomoj, sociaj centroj, ks. ĉirkaŭ 2500 flugfoliojn pri E° kaj 2500 pri la Pasport-Servo. Ni plie gluis 100 afiŝojn. ni elspezis el nia kaso ĉirkaŭ 800F por tiuj eldonajoj kaj la Federacio ĉirkaŭ 300F por la Pasport-Servo (nur por NANCY komprereble). Kun kiaj rezultoj?...

Nu, tre malgrandaj: entute 5 personoj interesigis sed neniu studento! Tri aliĝis al la kurso de la 20a30 en MJC Desforges. Se ni ne varbis kvnaton, ni varbis kvaliton: ĉiuj tri estas instruistoj (pri la angla, pri matematiko, pri teknologio) kaj la kurso tre bone kaj tre rapide funkcias. La antaŭvidita kurso de 18a30 provizore ne okazas.

Povus esti tamen sekvo interesa: per siaj propraj kontaktoj, Yves Scheffer, kiu gvidas la kurson en MJC, sukcesis interesigi krome dekon da medicinaj studentoj. Nova kurso povus komenciĝi baldaŭ en la faka universitato.

TOUL

Sinjoro Greiner disdonis 400 foliojn de la "METODO 4" kaj proponis parolan kurson. Ni informos poste pri la rezulto de tiu iniciato.

PONT-ST-VINCENT

S-rº René Guillaume, lernejestro, komencis kurson por 20 gelernantojn de sia lernejo. Tre bona artikolo aperis sekve en L'EST REPUBLICAIN kun okultrafa bildo.

VERDUN

S-inº Annik GAROT-PIAT, instruistino en Collège St-Exupéry en Thierville, prelegis pri E° en sia lernejo. Tio vekis grandan intereson kaj 22 gelernantoj volontas por parola kurso.

S-rº MACEK aperiĝis gravan anoncon en la magazino MONATO pri la loka agado de la sekcio Amnesty International. Multaj esperantistoj sekve skribis al la Prezidento de l' PARAGUAY por postuli senenkarcerigon de du laboristoj.

BAR-le-DUC

Dua-grada kurso funkcias, gvidata de S-rº Denis. Neniu homo enskribiĝis al la unua malgraŭ la kutima informado, al kiu aldoniĝis disdonado de flugfolioj "Metodo 4". La grupo kunveniĝas la unuan vendredon de ĉiu monato. Bedaŭrinde la Sekretariino, S-inº Fresse, subite forpasis post mallonga malsano. Emociiga ceremonio okazis, kiun partoprenis kelkaj klubanoj. Floroj estis oferdonitaj. S-inº Fresse estis unu el la plej sindonemaj klubaninoj.

COURS PAR CORRESPONDANCE

Depuis septembre nous avons envoyé 25 communiqués à la presse régionale; nous avons pu contrôler la parution de 15 d'entre eux. Nous avons informé le public à la fois sur notre cours par correspondance et sur le stage des 28/29 novembre. Nous avons reçu une quarantaine de demandes et 12 nouveaux élèves se sont inscrits. Par ailleurs le Secrétariat de la Fédération a adressé aux Inspecteurs d'Académie de Lorraine, d'Alsace et de Champagne une circulaire d'information concernant l'étude de l'espéranto. Les Inspecteurs ont à leur tour diffusé cette information par circulaire officielle dans leur Bulletin Départemental. Jusqu'à ce jour une douzaine d'enseignants se sont intéressés, parmi lesquels le proviseur d'un Lycée de Strasbourg et un Inspecteur Départemental de l'E.N.

Parmi les 50 personnes inscrites lors de la dernière année scolaire à notre cours, deux élèves supplémentaires atteignent la fin du cours (soit 6 au total):
M. Martin LANG, 54500 VANDOEUVRE, dirigé par M. Grossmann, après 5 mois d'étude, et
Mme francine PARADIS, 54110 DOMBASLE, dirigée par M. Greiner.

Félicitations!

STRASBOURG


Dum la oktobra kunveno S-inº OEHRI montris al nidiapozitivojn -mirindajn kiel kutime-pri Eilat kaj la Ruĝa Maro. En novembro, S-rº WICK, je sia vico, montris al ni sur la ekrano la belegajn bildojn, kiujn li faris en Gandia, la esperanto-feriloko en Hispanio.

La 14an de decembro ni festis la ZAMENHOF- kaj LIBROTAGON kunu kun la gesamideanoj el OBERKIRCH, kiuj venis kvarope en nian strasburgan kunvenon. S-rº ZIPFEL, nia prezidanto, bonvenigis la gastojn kaj malfermis la kunvenon per recito de "La Vojo" (Zamenhof) poste S-rº POPPECK, la prezidanto de la oberkirch-a grupo montris al ni unike belajn diapozitivojn, kiujn li faris en ZERMATT kaj BERGAMO, okaze de feri-tagoj en la kadro de la germana asocio de "Natur-Amikoj". Lia esperanto-teksto estis surbendigita. Ĉar estis la tago de la libro, li ankaŭ montris al ni la antaŭ nelonge aperitan libron de Ephraim Kishon, "Elektitaj Satiroj" sed ankaŭ sian libron "La vivo estas tute alia", konsistanta el aforismoj, kiuj li tradukis. Ni profitis la okazon por donaci al li la novan gvidlibron pri la urbo Strasbourg kaj la faldfolion "Strasburgo, urbo en kiu oni bone vivas en ĉiu sezono, kiuj ambaŭ aperis kun Eº-traduko. Tio, intertempe, aperis en la gazeto germana "Mittelbadische Presse". La festo finiĝis en restoracio "Gutenberg", kie ni trinkis alzacan vinon kaj gustumis alzacajn specialaĵojn same kiel... pizza kaj Beaujolais-Village!

Ekstere de la grapa aktiveco, ni volas substrekki la dinamismon de nia amikino S-inº Oehri, kiu aranĝis dum la feria semajno fine de decembro, esperanto-ekspozicion en la renkontiĝ-domo de LIEBFRAUENBERG, en la regiono de Woerth, norde de Haguenau. En la sama semajno ŝi faris tie prelegon pri Eº antaŭ ĉirkaŭ 60 personoj. Ni ĉiuj ĝojas pri ŝia sukceso.

Koncerne la kursojn: S-rº Zipfel havas 5 gelernantojn perkoresponde. En la Universitato (3a aĝo) venis en la parolan kurson du novaj gelernantoj kaj revenis tri el la pa-sinta kurso.

M. MULLER



LETERKESTO

el F-inº Colette CROCHET, Martine DECES kaj Maryse CHOLLET (Epernay)

"... Ne connaissant que les Premiers Rendez-vous avec l'espéranto, nous avons accepté avec plaisir de participer au 14ème stage parlé à NANCY... Nous avons beaucoup apprécié l'ambiance amicale mais regretté que la jeunesse ne soit pas plus largement représentée..."

el S-rº MERGER (St-JULIEN-les-VILLAS)

"... Unuafoje mi partoprenis en Eº-aranĝo en NANCY kaj mi opinias, ke la Junuldomo tre taŭgas por tiaj kunvenoj, ĉu pro la ĉambroj, kiuj estas komfortaj, ĉu pro la manĝoj, kiuj estas bonaj kaj ne multekostaj... en la rondo, kies temo estis la verko de J. Valano:"Cu li venis trakosme?" estis entute 11 partoprenantoj, el kiuj 4 estis germanoj kaj 2 hungardevenoj, kio alportis en la rondoj internacian etoson. Plie la mezaĝo de la partoprenantoj tute ne estis akademio. Kvankam mi ne tute konsentas kun la analizo de la respondeculo, mi iom lernis pri diversaj aferoj, ĉu lingvaj, ĉu psikologiaj kaj mi opinias, ke ĉiuj ĝuis altnivelan kurson dum tiuj du tagoj..."

el S-rº S. (D.)

"... kompreneble mi intertempe venis zoze hejmen. NANCY, speciale via instrumetodo, estis por mi kiel instruisto, granda zozo. Bedaŭrinde la de vi rekomenditan libron mi ne povis aĉeti. Mi deziras al vi kaj al via familio bonan zozan jaron... Salutas vin el tutzoza koro via E. S."

(La "zoz-problemon" povas aprezi nur la partoprenintoj de la 3a konversaci-rondo) (noto de la redaktoro)

el S-rº LUDWIG, gvidanto de la B-kurso

"... Varmajn gratulojn al la organizintoj de la sukcesa Nancy-a staĝo. Gojigis ankaŭ la konstato, ke alti-ĝis la nivelo de la B-kursanoj".

el S-rº Klaus HÜLTJE (Stuttgart)

"... mi ricevis la gazeton INFORMILO kaj mi dankas vin kore. Tiu gazeto estas vere tre interesa kaj mi ŝatas ricevi ĝin regule... la artikoloj donas gravajn informojn por la Esperantistoj. En Germanio ankaŭ estas multaj gazetoj pri la Eº-movado sed via gazeto estas la plej bona..."

EL NIA 14^a STAGO

Ĝi okazis denove en NANCY la 28/29a.jn de novembro 1982. Ĝi estis la unombero ankoraŭ iom pli sukcesa ol la antaŭa (sed nun ni kutimas pri tiu fakteto): 90 homoj aliĝis, "nur" 87 efektive partoprenis; venis homoj kiel kutime el tuta orienta Francio ĝis DIJON kaj TROYES, kaj el LONDONO, el DRESDENO, kaj deko da personoj el okcidenta Germanio (Sarlando, Stuttgart, Frankfurt, Messkirch). Ni ja atingas la limojn de eblecoj por la organizado mem de la staĝoj en NANCY. Ni sukcesis lastmomente disponi 6an salonon en la Junuldomo, tiel ke ni povis aranĝi 6 kursojn anstataŭ 5. Funkciis do 2 kursoj A1 por komencantoj, gviditaj respektive de S-roj Guillaume kaj Colnot, kun deko da lernantoj en ĉiu kurso. Funkciis kurso A2 kun 15 progresantoj gvidita de S-rº Vivier, kurso B kun 20 ekpraktikantoj gvidita de S-rº ludwig. La plej lertajn gvidis respektive S-rº Denis, studante la "Fabelojn de la Verda Pigo" (15 personoj) kaj S-rº De Zilah, kiu kun 12 aliaj personoj en konversaci-rondo D, provis respondi, ĉu li efektive "venis trakosme". La libro-servo, kun S-rº Degrelle kaj S-inº Colnot funkciis vigle kiel kutime, krome S-rº Degrelle gvidis ekzamenojn dimanĉe matene. S-inº kaj F-inº Roux prizorgis la akceptadon, la disdonon de la ĉambroj kaj la kontojn ĉe la staĝo, kio signifas jam multe da preparlaboro antaŭ... kaj multajn zorgojn ankoraŭ poste, kiam ĉiuj jam revenis hejmen.

sabate vespero la Nancia Folklor-Grupo "LA RONDE LORRAINE (La Lorena Rond-Danco) prezenti unue belajn lorenajn melodiojn luditajn de lerta orkestro de "spinetoj" (tipaj muzikiloj de la lorenaj kamparo kaj vogeza montaro) kaj poste akompanataj de violonistoj, tutan programon de lorenaj dancoj. Ĉiuj artistoj, muzikistoj kaj dancistoj tiel lerte ludis, kaj tiom varme prezenti sian folkloron, ke ili rikoltis tre longajn aplauzojn. El ĉiuj eroj de tiu vespero verŝajne elstaras la "danse des cerceils", danco kun tre larĝaj neĝo-ŝuoj, kie la kompatindaj knabinoj ŝajnis ĉefe zorge eviti la premon de siaj piedoj far la larĝaj ŝuegoj de la kundancantoj! Ĉu mi aldonu, ke je laafino okazis greka danco gvidata de nia amiko Evangelo Panoussis! Kaj intertempe loterio kun multaj tre multaj lotoj... fakte ĉiu aĉetinto de bileteto gajnis loto(j)n!

J.P. Colnot

SINCERAJN GRATULOJN AL TIUJ FRESBAKITAJ SUKCESINTOJ EN LA EKZAMENOJ 1980/1981



A T E S T O P R I L E R N A D O

AMBLES-BLOCH Lidja
BECK Isabelle
BOUVERON Jean-François
CONCESSI Vincent
DILLENSCHNEIDER Mireille
GALOS Daniel
GARER Catherine
GEANT Michelle
GILBERT François-Xavier
GODEFROY Maryse

GUILLAUME Danièle
HURT Camille
LEHMANN Lison
MANGEOL Jean-Claude
MIDREUIL Fabienne
MIDREUIL Frangois
NAFFZGER Anne-Marguerite
PIANT Nathalie
ROUX Madeleine
SPRAVEL Hélène

A T E S T O P R I P R A K T I K A L E R N A D O

BECK Isabelle
BOUVERON Jean-François
FRESSE Marguerite
HÆUSSER Marguerite
ROUX Catherine

P E D A G O G I A A T E S T O

LUDWIG Edmond

J.W.F.O. angulo!

AIX-en-PROVENCE (Francio)

Franca-Germana renkontiĝo por junularo
9a/15a de julio

La junaj Francoj, Germanoj -kaj alinacianoj!- estos akceptitaj en la tre bone ekipita "Hejmo St-Eloi" de l' malnova urbo AIX.

La programo antaŭvidas laboron en grupoj, kiuj pristudos la temon ""Sociaj kaj kulturaj aspektoj de l' turismo". Provinco Provence posedas tiurilate tre apartan intereson, ĉu pro siaj multnombraj allogaĵoj, ĉu pro problemoj starigitaj de diversaj fenomenoj, kia estas ekzemple somera svarmado de l' germanaj turistoj.

Inter la ceteraj programeroj ni plue notu tuttagan viziton de la regiono, partoprenon al la tradicia popolbalo de l' 13a de julio, artajn manlaboraĵojn, viziton de la urbo... kaj multifacetan nenionfaradon!

Dank' al atendataj monsubvencioj de O.F.A.J. (Franca-Germana Ofico por junularo) partopreno de ĉiu interesulo estas ebla: 180FF por junul(in)o sub 26 jaroj kaj ĉirkaŭ 250FF por pliaĝuloj (enskribiĝoj ĝis majo);

Ĉiujn informojn vi ricevos el JEFO, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

TUTMONDA KONGRESO DE T.E.J.O.

Kiel ĉuijare, TEJO (Tutmonda Esperantista Junular-Organizado) okazigas sian kongreson kunlabore kun unu el siaj naciaj sekcioj. Ĉisomere la rendevuejo estas en LOUVAIN (LEUVEN) Belgio de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto.

INTERESA PROPONO DE B.E.M.I. (Biciklista Esperantista Movado Internacia)

Ĝi planas biciklan vojaĝon de AIX al LEUVEN kaj poste amikan kunbicikladon postkongresan kies alvenpunkto ne jam estas fiksita... eble al Nederlando aǔ direkte al BAR-le-DUC (Francio, inter Parizo kaj Strasburgo) kun vizitoj kaj diversaj aktivecoj.
(Interesuloj bonvolu kontakti Eckard BICK, Elberstr. 30, D-5300 BONN - Germanio)

GRANDA KARNAVALA SEMAJNFINO EN BAR-le-DUC!

19/21ajn de marto 1982

ORIENTFRANCA RENKONTIĜO de

Junulara Esperantista Franca Organizo

PROGRAMO: maskofarado, partopreno en maskobalo kaj surstrata maskpromeno de la enloĝantaro; distrado, promenoj...

RAPIDE ALIGU!!! (*aliĝkotizo... unika sumo postulata!... estas 50F por Francoj kaj 25F por Eksterlandanoj -ili povos pagi surloke*)

Vi tranoktos ĉe esperantistoj: kumparku dormsakon kaj maskvesojn aǔ ŝtofojn.

Sendu nur kelkajn vortojn (... "Mi aliĝos al la KARNAVALA SEMAJNFINO... ktp...") al:

Lydia AMBLES-BLOCH, 11 rue des Ducs, 55000 BAR-le-DUC,
telef. (29) 79 33 55 preferere vespere

Pro bedaûra evento la adreso de la "ESPERANTO-OAZO" pri kiu varme informis nia amiko S-ro CLAUDEL en la lasta n^o de LA INFORMILO (n^o36) ne ku^Sis en la artikolo.

Se vi volas feritempi en tiu paradiza edeno, vi bonvolu skribi al:

Akiles Sanz, Apartado 171, GANDIA (Valencia) Hispanio



elektu kaj partoprenu !

(datoj nepre notendaj... TUJ!!)

28an de februaro 1982:

- komitat-kunveno de la Federacio en NANCY (Junuldomo Desforges)
(nur por komitatanoj)

19an/21an de marto:

- amika, internacia renkontiĝo okaze de Karnavalo en BAR-le-DUC
(aparta komunikilo en ĉi-tiu INFORMILO)

27an/28an de marto:

- kultur-semajn-fino en Mesnil-st-Père (apud TROYES, Francio)
(informas: Suzanne BOUROT, 15/B rue Morel-Payen F-10000 TROYES)

3an/4an de aprilo:

- FEDERACIA KONGRESO en MULHOUSE-RIEDISHEIM
(aparta aliĝ- kaj informbulteno en ĉi-tiu INFORMILO) || ĉeestinda!

4a/11an de aprilo:

- Internacia Printempa Seminario en Kultur-Domo de Grésillon (Francio)
(kun diversnacidevenaj infanoj)
(ĉu vi ne jam "gustumis?"... nepre ĉeestu! - informas: EESPANTO-KULTURDOMO 49150-BAUGÉ(F)

14an/16an de majo:

- printempa renkontiĝo de Sudokcidenta E^o-Ligo (SOGELO) en MESSKIRCH (germanio)
(eksterordinare alloga programo!... - informas: Bernard EICHKORN, Kolpinstr. 8, D-7790 MESSKIRCH)

En STRASBURGO aperis du prospektoj trilingvaj kun teksto en Esperanto:

- = "STRASBURGO, URBO EN KIU ONI BONE VIVAS EN CIUJ SEZONOJ"... mendebla en "Office du Tourisme, Palais de la Musique et des Congrès, 67082 STRASBOURG-CEDEX.
- = "NOVA GVIDLIBRETO KUN MAPO DE STRASBURGO", bela ruĝa disfaldado mendebla ĉe "Mairie de Strasbourg, service du Tourisme, Centre Administratif, 67070 STRASBOURG-CEDEX.

... mendu ilin kaj montru al tiuj oficoj, ke vi interesigas pri la tekstoj en E^o, por havigi ilin al viaj eksterlandaj geamikoj, kiuj scipovas nek la francan, nek la anglan, nek la germanan lingvon.

Fra^ulino Roza GEORGIEVA
Str. Stefan Denčev, № 14
5000 VELIKO TARNOVO


... deziras korespondi kun samideano franca

B U L G A R I O

funebro

Sinjorino Marguerite FRESSE, sekretariino de la Esperanto-Klubo de BAR-le-DUC forpasis la 10an de januaro 1982, post fulma malsano. La katolikan ceremonion gvidis ŝia propra filo, kiu estas pastro. Dufoje dum la meso estis aludite, ke ŝi praktikis Esperanton. Pluraj membroj de la loka grupo ĉeestis kaj florgarbo estis oferdonita.

Ni prezentas al la tuta familio niajn plej sincerajn kondolencojn.



angulo de l' pensulo

pri tiu rubriko respondecas
nur la aŭtoroj de la artikoloj.

Estimata sekretario,

Okaze de Eŭropa Renkonto oni debatis pri l' grava problema de la lingvoj; ĉar oni aludis Esperanton, iu partoprenanto transdonis al mi ekzempleron de via bulteno, en kiu estis elvokita ia reformo de tiu lingvo.

Kvankam mi ne estas esperantisto - kio ne kontraŭas mian simpation al la afero - mi kuraĝas komenti du erojn de tiu artikolo...

1/ "La komputiloj ne permesas la korektan reproduktadon de la tipaj literoj de l' esperanto-alfabeto".

La aŭtoro de tiu-ĉi opinio "malfruas je unu milito" (1)! Li certe ignoras, ke se tia situacio ekzistis, kiam temis pri l' malnova generacio de l' komputiloj, la novkonstruitaj kapablas asimili sen iu ajn malfacilajo, iun ajn grafismon, eĉ la araban aŭ ĉinan skibarton (vidu piednoton). Laŭ la ingénieroj de I.B.M. United Kingdom Laboratories, la literoj propre "esperantaj" neniel problemas por la modernaj komputiloj.

2/ "La tutmonda disvastiĝo de Esperanto daure estas bremsata de l' ekzisto de distingaj ortografiaj karakteroj".

Mi tute ne samopinias. Laŭ tio, kion mi scias pri la medio de l' esperantistaro, tiu ĉi lasta kulpas je 90% ĉar, superidealista, la esperantistoj tute mankas je realismo por organizi efikan inform-kampanjon. Invoki la "specialajn literojn" estas ja provo por pravigi sian propran inercion aŭ senefikecon! La esperantistoj ne nur restas en siaj gettoj, kie ili pridiskutas nur lingvo-problemojn, neutilajn statutojn, dubreciajn projektojn - interalie tiun-ĉi reformon de Esperanto-alfabeto - sed plie ili ĝenerale malkapablis, almenaŭ ĝis hodiaŭ, uzi kaj uzigi utile sian lingvon por profesiaj aŭ sciencaj celoj.

Kio fakte bremsas disvastiĝon de Esperanto, kuŝas unue en la kadukaj metodoj de pioniroj, metodoj, kiuj svarmas en via movado; tutevidente estas pli facile diskutaĉi pri statutoj kaj reformoj.

Eliro el viaj gettoj, aktualigu viajn persojn kaj agadteknikojn, estu pli realistaj kaj entreprenemaj... sekve Esperanto povos finfine disvastiĝi. Vidu la anglan lingvon, kiu firme enradikiĝis tutmonde en ĉiuj medioj spite ortografiion dekoble "malpli racian" ol tiu de Esperanto!

Marie-Rose FRANCKX
B-OOSTENDE

Bonvolu akcepti, Sinjoro
Sekretario, l' esprimon de miaj distingaj salutoj,

(1) "malfrui je unu milito": tipe franclingva esprimo signifanta treege malfrui!
"être en retard d'une guerre".

(2) Jen fotokopio de artikolo aperinta en la revuo franclingva SCIENCE ET VIE (majo 1981)

INFORMATIQUE

ENFIN, LE CHINOIS SUR ORDINATEUR !

Avec 50 à 60000 caractères, dont 6 à 8000 d'usage quotidien, la langue chinoise semblait brouillée à jamais avec la programmation sur ordinateur. Comment, en effet, enseigner à un ordinateur la manière de tracer des caractères aussi nombreux et aussi complexes et, de surcroît, généralement dessinés au pinceau ?

五百里滇池奔來眼底
底坡巾岸情喜茫茫
空闊無邊看東骧神
駿西書靈巒北走蜿蜒南翔
編音高人領士何妨遺勝景臨

M. Tung Yun-Mei, un Chinois travaillant à l'université Stanford aux États-Unis, y est pourtant parvenu. Le texte que voilà est un couplet vieux de deux siècles.

← Jen la teksto, tia kia ĝi eliris el la komputilo

← Jen ĝi tradicie manskribita.

五百里滇池奔來眼底
底坡巾岸情喜茫茫
空闊無邊看東骧神
駿西書靈巒北走蜿蜒南翔

* cotisations 1982 *

Vous venez de recevoir le n° 36 de la INFORMILO, dernier de votre abonnement 1981. Afin de recevoir toute la série de l'an prochain, nous vous invitons à vous acquitter de vos cotisations dès maintenant, cette procédure facilitant grandement notre travail tout en vous assurant un service ininterrompu de votre bulletin. Vous trouverez ci-dessous le nouveau tableau des cotisations pour 1982.

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national tant sur le plan informatif général que sur celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS

- 1/ De préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP 1997 72 W NANCY
- 2/ Par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération (ce chèque est à envoyer à notre trésorier A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM)
- 3/ Exceptionnellement les membres du groupe de STRASBOURG sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO - CCP 49917 STRASBOURG en y ajoutant leur cotisation au groupe de STR. (10F) ou à leur trésorier Bertrand WICK, 2 rue du Loess, 67200 STRASBOURG.
- 4/ Les cotisations à l'UFE et à l'UEA (catégorie 3 & 4) peuvent être payées, à partir de cette année, directement à l'UFE - CCP 855 35 D PARIS, l'abonnement à LA INFORMILO restant à payer à notre trésorier (voir 1/... et 2/)
- 5/ Les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE, de JFEO ou de l'UFE, ainsi que les membres à vie, voudront bien payer à part leur abonnement à notre trésorier comme indiqué en 1/... et 2/

CAT	TABLEAU DES COTISATIONS 1982	- de 26 ans	+ de 26 ans
1 - abonnement simple à LA INFORMILO		18F	18F
2 - adhésion <u>simple</u> à la FEDER. CULTUR. DE L'EST			
* membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)	13F + 18F	13F + 18F	
* membre fédéral <u>sans abonnement</u> (pour les autres membres de la famille par exemple)	13F	13F	
3 - adhésion à la FEDERATION <u>et</u> à l'UFE			
* membre titulaire junior (avec la revue de l'UFE, FRANCA ESPERANTISTO)	85F + 18F	85F + 18F	
* membre titulaire senior (avec la revue de l'UFE)		125F + 18F	
* membre titulaire (conjoint)		65F	
* membre sympathisant	40F + 18F	40F + 18F	
4 - adhésion à la FEDERATION + UFE + UEA			
* membre individuel (reçoit "F.E°" + annuaire de UEA + la revue "KONTAKTO" si moins de 25 ans)	139F + 18F	179F + 18F	179F + 18F
* membre individuel (reçoit "F.E." + annuaire de UEA + revue mensuelle mondiale "ESPERANTO"... + la revue "KONTAKTO" si moins de 25 ans)		260F + 18F	260F + 18F
	220F + 18F	220F + 18F	220F + 18F

IMPORTANT

- A/ Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et le bulletin trimestriel régional LA INFORMILO (pour les abonnés).
- B/ Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membres de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1982 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C/ Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE) sauf catégorie 2.
- D/ Les jeunes jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance (inscription d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JFEO) sauf catégorie 2. Ils recevront en plus le bulletin "KONCIZE".

FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... abonnez-vous !

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.

(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F) Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto - CCP 1997-72 V NANCY

+ ESPERANTO	revue offic. de UEA abonnement simple	mensuel	81 FF
+ KONTAKTO	revue pour adolescents et jeunes gens	4 n°s	41
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens	6 n°s	15
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle	6 n°s	50
+ HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'inform. format journal	18 n°s	71
+ HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisat. scientif.	4 n°s	10
+ LITERATURA FOIRO	revue littéraire	4 n°s	58
+ MONATO	magazine international	11n°s	154
+ JUNA AMIKO	style simple - parfait pour débutants	3 n°s	20
MONDA KARUSELO	nouveau magazine en E°	4 n°s	10
HORIZONTO	revue du "mouvement neutre" E°		75
LA MIGRANTO	bulletin des "amis de la nature"		23
+ SCIENCA MONDO			24
+ INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO			26
+ EUROPA DOKUMENTARO			46

Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.

Celles qui suivent sont généralement qualifiées "d'engagées"

+ BIBLIA REVUO		36
+ OOMOTO	revue japonaise (philos. relig.)	6 n°s
ESPERO KATOLIKA		40
FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO		56
+ DIA REGNO	internationale (protestante)	20
SAT-AMI KARO	bulletin mens. des trav. et syndic. franç.	48
SENNACIULO	même tendance mais international	70
+ EL POPOLA ĈINIO	de Chine Populaire - en couleurs	90
	1 an	27
	2 ans	44
	3 ans	66
+ LA KANCERKLINIKO	d'avant-garde, politique et culturel	4 n°s
		44

→ Il est en outre également possible de commander à notre trésorier des petites affichettes de propagande, format 20 X 5,5 cm - 5 textes différents sur papier de 6 couleurs différentes:

10 → 2,80 F franco, 40 → 5,50 80 → 10F



* Vous pouvez également vous procurer des vignettes gommées (4X3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents.

2 feuillets (18 vignettes)	2F
10 FEUILLETS (90 vignettes)	7,60F franco de port
25 feuillets (225 vignettes)	18F

* Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi.

Les 8 cartes : 4F → les 20 cartes: 9F

Figure aussi sur notre catalogue le lexique bien connu de F. LEGER (Esperanto-Français)

1 ex. — 6F + 2,60F = 8,60F	2 ex. — 10F + 5,10F = 15,20F	5 ex. — 20F + 7,50F = 27,50F
10 ex. — 30F + 10,70F = 40,70F	20 ex. — 50F + 15,50F = 65,50F	

Ces prix pourront être éventuellement réajustés au moment de la livraison.

Se vi jam pagis vian kotizon por ĉi-jaro, vi trovos en ĉi-tiu n^o kelkajn aldonitajn glu-markojn. Novaj UFE-membroj aparte ricevas la membro-kartojn.

Orientfranca
Federacio
1982

1/ Jarmarko por ĉiuj niaj membroj (federaciaj kaj aliaj)
Vi gluu ĝin dorse de via Federacia Membro-karto.
(tiucele vi forigu la subpaperon... la marko estas memgluebla).

UFE 1982

**MEMBROMARKO
UEA 1982**

**U
E
A 1982 E
A**

2/ Jarmarko por la UFE-membroj. Ĝi estas rozkolora por la simplaj membroj, kaj blua por la individuaj membroj. Vi gluu ĝin sur vian UFE-Membro-karton.

3/ M La membro-mark-folio de UEA konsistas el:

= membro-markoj uzendaj por rilati kun UEA-delegitoj.
ili atestas vian membrecon (gluenda sur ĉiu pet-letero al iu ajn delegito.)

= La Jarmarko por la UEA-membroj. Vi eltondu ĝin kaj surgluu sur vian UEA-membro-karton

Se vi ne jam pagis vian kotizon aŭ vian abonon vi trovos en ĉi-tiu bulteno novan kotiztabelon kaj memorigilon, per kiu vi povos informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidon kaj urĝe pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu n^o de LA INFORMILO estas la lasta sendita al vi se vi ne renovigas ĝin



Se via pago interkruciĝis kun la sendo de tiu-ĉi INFORMILO, tiam intertempe via abono ordiĝis kaj la kunsendita alvokilo ne plu koncernas vin!

AL NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ ★

en la antaŭa kaj en ĉi-tiu n^o de LA INFORMILO aperis (-ras) granda kotiz-tabelo, bedaŭrinde franchlingve, pri la kotizoj kaj abonoj por 1982. Tial ni deziras aparte informi al niaj eksterlandaj abonantoj, ke la abono al LA INFORMILO por 1982 estas 18FF aŭ 8 "internaciaj kuponoj" (respond-kuponoj aĉeteblaj ĉe ĉiu poŝt-oficejo)

Se vi ne jam pagis vian abonon por la nova jaro, bonvolu fari tion sen prokrasto.

Vi povas pagi per simpla poŝta giro al nia Poŝt-Cek-Konto:

— FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO
P.C.K° 1997-72 W NANCY

aŭ per sendo de 8 IRK al nia kasisto:

— S-r^o André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées
F 68390 BALDERSHEIM

Krome ni deziras informi vin, ke ĉi-tiu n^o estas la lasta sendita al vi, se vi ne plej frue kiel eble ne renovigos vian abonon.


se vi jam pagis vian abonon, tion vi facile povas kontroli jene: kiam supre de via adreso sur banderolo troviĝas kod-numero, kiu komenciĝas per 2 (ekz. 2A63), tiam vi povas esti certa, ke via abono por 1982 estas pagita.

la kasisto
A. Grossmann



distrU angelo

KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE: 1 bondeziroj de la redaktoristoj (daŭrigo ĉe la 13a) - ĝi kvakas - kelkaj verdaj folioj - 3 rapide suprenflugi - ĝi fariĝas fromaĝo - frotpurigilo (rad). 4 arbedo malalta - kurbigita fadeno. 5 oni serĉas ĝin dum la hundotagoj (rad) - artikolo. 6 mara birdo - fini versojn per ia sonfiguro. 7 kiel el multvalora metalo - adverbo - pronomo. 8 helena poetkantisto - koordinato - 9 la kerno, la plej ĉefa parto - arbedo en ĝardeno (rad) 10 mediteranea herbo, kiu produktas kolorigan substancen - norda remaĉulo - konjunkcio. 11 greka lintero - surpentri per specia kolorigilo - konjunkcio. 12 signo - posedajo (rad) - muziknoto. 13 prepozicio - pronomo - alia pronomo.

VERTIKALE: 1 legomo - nesimpla gaso - artikolo. 2 grandega - koncize esprimi - reprodukti aǔ selekti(rad) - furaĝplanto. 4 ĝi indikas preteriton - sufikso. - mallarĝa rivereto - gardena herbo (rad). 5 bongusta pasto - litero - mezurunuo. 6 variaĵo de gipso - spirado (rad). 7 rabobesto kun pinta nazo (rad) - litero - koncepto - pinglarbo (rad). 8 oni ĝin krakmanĝas agrable (rad) - sensperite kredema - pronomo. 9 ringforma insulo (rad) - adverbo - malutili - adv. bo. 10 specia strofio el tulo - posedata de - la prapatro de pluraj homoj rasoj - pronomo. 11 fariĝi ie aǔ iam - scienco pri la moralo - cifero. 12 menции per preciza vorto - flankrivero al Sejno - musteledoj.

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabeto ordigitaj silaboj, malkovru la vortojn kies difino troviĝas dekstre. La la kaj a kolonoj vertikale legataj formas proverbon.

ab - ble - ci - ek - et - eto - fa - fo - go - ik - ino - ko - kro - li - me - me - mo
ni - no - no - nu - od - oso - pro - ra - ri - ro - ro - rup - sa - sa - sta - ta - te
ti - to - ur - zo

1 + - - + - -	ci-tiu estas la 37a
2 + - - + - - -	plej alta grado de admirado
3 + - - +	"Ĉu ĝi vere venas trakosme?"
4 + - - + - -	malsano
5 + - - + -	ekskrementa likvado
6 + - - + -	ĉiam simpatia en E°-medio
7 + - - + - -	arbo
8 + - - + - -	tenas sub sia jugo
9 + - - + - - -	malagrabla subita
10 + - - + -	osto de mamuloj
11 + - - + - - -	demando solvata per sciencia metodo
12 + - - + - -	longa bendo ofte el ledo
13 + - - + -	poemeto
14 + - - + - - -	glutema ĉelo

Vends 305 "break" diesel
GLD, blanc, 7000 km, 6 mois.
GROSSMANN, tel. 45 62 89
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

INFORMILO n°35 - krucvortoj: sunradio-iv-tlaspo-blovo-ripozi-edroj-akoro-ek-air-nodi-rosso-\$il-diri-groto-da-okazo-drivi-koto-kastelo-enologo-oleo-torino-drama-oj-egale-aloz

INFORMILO n°36 - krucvorto: koloroj-\$oki-abolicio-ĉi-pend-entjer-sigel-agro-si-uliko-noa-ned-legumen navo-ocim-boaco-al-tinea-tuber-io-un-ruza-rid-an-radsulko-lopo-iom-eđo

silab-enigmo: "pli valoras paco malbona al malpaco plej bona"

ADHESION AU 41ème CONGRES DE LA
FEDERATION FRANCAISE DE L'EST
POUR L'ESPÉRANTO

★ aligilo ★

Nomo ----- Antaùnomo -----

Adreso -----

Nomo kaj adreso de la akompanantaj
personoj

Nombro de personoj entute -----

Mi (Ni) alvenos per trajno/ per aûto *
je la --- horo, sabate/ dimanĉe *

Mi rezervas * bonvolu trastreki nevalidaĵon

--- ĉambro(j)n kun 1 lito 44 FF
--- ĉambro(j)n kun duobla lito
(por paro)... po persono 42 FF
--- lito(j)n en 6- aû 8-lita ĉambro
... po persono 25 FF
--- vespermanĝo(j)n por sabate 35 FF
--- matenmanĝo(j)n por dimanĉe 9 FF
--- tagmanĝo(j)n por dimanĉe 40 FF

Mi sendas banko-ĉekon je --- FF aû...

Mi gîras per postâeko la sumon de --- FF

Mi (ni) satis viziti dum la kongreso
post-tagmeze *


= fervojan muzeon
= aûtomobil-muzeon
= historio-muzeon
= muzeon pri surstofa
presado
= la zoologian ĝardenon
= la urbon MULHOUSE

sabate	dimanĉe
-----	-----
-----	-----
-----	-----
-----	-----
-----	-----
-----	-----
-----	-----

Mi estas kandidato por la renovigo de
la federacia komitato: jes ne

* indiku la nombron da personoj, de ĉi-tiu
aliĝilo, sub la koncernaj tagoj

supplément à "LA INFORMILO" 37



por aliĝi al la kongreso, bonvo-
lu sendi la ĉi-apudan aliĝilon.

pour adhérer au Congrès veuillez
envoyer le feuillet ci-contre
kun antaupago de 35 F por ĉiu persona

kiel eble plej frue sed nepre antaû la
15a de marto 1982

al
S-rº André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
P.C.K. 819 34 U STRASBOURG

ALIG-KOTIZO: 35 FF por ĉiu persono
20 FF por akompananta edz.
20 FF por ĉiu junulo de
12- ĝis 18-jara

en tiu kotizo estas enkalkulita la bileto por la
spektaklo

la infanoj sub 12 jaroj akompanantaj la gepatrojn
ne pagos kotizon

Eksterlandanoj, kiuj aliĝas al la
kongreso, ricevas senpagan abonon
al LA INFORMILO

ALIAJ KOSTOJ:

= 1 vespermanĝo (sabate)	35 FF
= 1 tagmanĝo (dimanĉe)	40 FF
= 1 matenmanĝo "	9 FF
= 1 tranoktado en CENTRE D'ACCUEIL A. WALLACH...	
... en 1-lita ĉambro	44 FF
... en duobla-lita ĉambro (por paro)	42 FF
... en 6- aû 8-lita ĉambro	25 FF

3^{an} kaj 4^{an}
de aprilo 1982

41^a kongreso
de la Esperanto-Federacio
de Orienta Francio



kongreskunsidoj *
→ *allogaj vizitoj
→ eksposicio * libroseruo
→ varieta
→ vespero

por atingi la kongresejon

PROGRAM

sabaton, la 3an de aprilo —
15a: Oficiala malfermo de la kongreso
(Ĉeesto de Jurnalistoj kaj oficialuloj)

15a30 8j5 18a30:

A/ por vizitantoj: vizito de la famaj
Mulhouse-aj muzeoj àù de la zoologia
parko B/ por federacianoj kaj observantoj:
KONGRESAJ LABOROJ

- = raportoj de la diversaj urboj
- = raporto pri la koresponda kurso
- = federaciaj raportoj (agada kaj financa)
- = elektro de novaj komitatanoj
- = raporto de UFE + elektro de la novaj komitatanoj
- = rezolucioj
- = prezento de la nova aquadprogrammo

20a30: Distra vespero kun JAK LEPUIL
de la kabaredo "La Ruza Kruĉo" (PARIZO)
NOTU BONE: Jak Lepuil regaloj nin
NUR EN ESPERANTO!

dimançan, la 4 en

9a: Prezento de la nova agadprogramo Diskutoj

= kion povas fari unuopulo por disvastigii
nian lingvon? – ankaŭ bonvenaj estos la
speroj de niaj eksterlandaj geomikoj.

= kion deziras trovi la gejunuloj en nia movado? - kion ili pretas fari por helpi al realigo de siaj deziroj?

12a: tagmango

卷之三

16a: prezento de la nova estraro ka,
fermo de la kongreso

eventuale :
antaú la forsendo de mia alígilo mi bone notu ci-tie
"mi enskríbiðis dor vizito de la

